



**madrida esperanto-liceo**

**majo 2011**

## **RAPORTO EN TELEMADRID**

La madrida televidstacio TeleMadrid kontaktis la madridan movadon por pretigo de raporto pri nia lingvo.

La filmado okazis la vendredon 8-an de aprilo: ok personoj kunvenis en teraso, kie oni filmis trankvilan babiladon, kaj kie poste la teamo intervjuis tri homojn: Toño del Barrio parolis ĉefe pri la nuna stato de la lingvo kaj la movado en la reto, Ana Manero pri Pasporta Servo kaj Andy Hernández pri Vikipedio en Esperanto. La televidskipo ankaŭ filmis diversan materialon en la sidejo, kaj petis aŭdvidaĵojn por kompletigi la raporton.

La raporto aperos en la novaĵprogramo dum iu semajnfino komence de majo.

## **EKSKURSO AL BURGOSO**

Madrida Esperanto-Liceo organizas ekskurson al la urbo Burgoso (Burgos) la sabaton 7-an de majo por viziti la novan Muzeon pri Homa Evoluado, <http://www.museoevolucionhumana.com>, kiu estis kreita pasintjare post la ĵusa elfosado de tre gravaj arkeologiaj restaĵoj en la proksima loko Atapuerca.

La enirbileto por la muzeo kostas po 6 €. La vojaĝo estas individua, kaj oni grupiĝos je la 11:00 h ĉe la enirejo de la muzeo. Kontaktu Liceon (telefone aŭ pere de la retadreso [saluton@wanadoo.es](mailto:saluton@wanadoo.es)), por koni praktikajn detalojn pri la ekskurso.

## **LEGADO DE DON KIĤOTO**

Membroj de Madrida Esperanto-Liceo partoprenis denove en la jam tradicia laŭtlegado de la tuta verko "Don Kiĥoto de La Manĉo" en la madrida kulturejo Círculo de Bellas Artes. La 28-an de aprilo je la 17:45, Toño del Barrio, Alejandro Pareja kaj Manolo Parra legis tri pecojn de la konata verko, laŭ la esperanta traduko de Fernando de Diego.

La aktivado estis spektebla en la retejo <http://www.circulobellasartes.com/quijote11.php>.

Post la legado Toño del Barrio estis intervjuita de la radistacio de la kulturejo, Radio Círculo.

## **OKAZIS DUM APRILO**

La Kultura Centro Eduardo Chillida de la kvartalo Moratalaz montris ekspozicion pri Esperanto, inter la 16-a kaj 29-a de aprilo, kun la kunlaboro de Madrida Esperanto-Liceo kaj utiligante la panelojn pretigitajn de Hispana Esperanto-Federacio.

Dum la Nokto de la Libro, la 27-an de aprilo, okazis publika legado de ŝatataj verkeroj fare de laboristoj de la Nacia Biblioteko de Hispanio, dum kiu Jorge Camacho legis, en Esperanto kaj en sia propra hispanigo, la poemon "Spuroj" de Baldur Ragnarsson.

La 8-an de aprilo estis malfermita Esperanto-fako en la anarĥiista librejo "La Malatesta" (strato Jesús y María, 24 - Madrido) kiun nutros la libroservo de SAT-en-Hispanio. La inaŭguron oni celebris per evento publika, dum kiu anoj de SATeH prelegis pri literaturo kaj pri la rilato inter Esperanto kaj liberecanaj medioj.

Jorge Camacho estis intervjuita ĉe Radio de la Universitato Complutense, Info Radio. La programo estis aŭskultebla la 10-an de aprilo, dimanĉe, je la 16:00, pere de jenaj ligiloj: <http://inforadioucm.es/> aŭ <http://complumedia.ucm.es/canal.php?p1=inforadio>.

## **HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO**

70-a Hispana Kongreso de Esperanto okazos en San Lorenzo de El Escorial de la 28-a de junio ĝis la 3-a de julio, organizata de Madrida Esperanto-Liceo kaj Hispana Esperanto-Federacio. La kongreso okazos en Kulturdomo de San Lorenzo, situanta en Unua Domo de Metioj, historia konstruaĵo projektita de Juan de Herrera samstile kiel la Monaĥejo kaj tre proksima al ĝi.

Krom ekskursoj, prelegoj kaj koncertoj, okazos oficialaj ekzamenoj de Esperanto laŭ Komuna Eŭropa Referenckadro. Estos bonega okazo por akiri oficialan diplomon de Esperanto.

Por aliĝi kaj havi plian informon: <http://www.esperanto.es/kongreso>. Hispana Esperanto-Federacio kreis spacon en la reta socio Facebook. Se vi anas en tiu ĉi, vi povas koni iliajn novaĵojn en <http://www.facebook.com/esperanto.es>.

## **AUGUSTO EN AZIO**

Daŭras la restado kaj la agado de nia samgrupano Augusto Casquero en aziaj landoj. Li nun troviĝas en Vjetnamio, kie li instruas Esperanton al du grupoj de universitataj gestudentoj, al alia grupo kiu konsistas el instruistinoj de infanĝardeno, kie okazos la Infana Kongreseto, al du grupoj de miksitaj aĝoj, kaj al tria grupo de universitataj gelernantoj.

Li ankaŭ partoprenis dum aprilo diversajn agadojn, interalie omaĝojn al la memoro de D-ro Zamenhof, okaze de la datreveno de lia morto. La unua okazis la 9-an de aprilo en Hanojo, dum la ĉiujara "Printempa Renkontiĝo", kun la ĉeesto de granda kvanto da vjetnamaj geesperantistoj. Augusto parolis en la komenco pri Doktoro Zamenhof kaj pri la naskiĝo de Esperanto, kun prezentado de fotoj, de la voĉo de la Majstro, de la kanto "Mi volas danki vin" de Georgo Handzlik, kaj de la himno de Esperanto. Li gratulis la vjetnaman movadon pro la bonega kaj entuziasma laboro por Esperanto, por la internacia amikeco, kaj en la preparado de la UK de 2012, kiu okazos en Hanojo.

La 16-an de aprilo 2011, en la sidejo de la Asocio de Esperanto de Kantono (Ĉinio) okazis nova omaĝo. La salono de la asocio estis plenplena de samideanoj kaj gelernantoj. Parolis pri la Majstro nome de la loka movado s-ro Petro Ye, kaj denove Augusto kiel gasto de la asocio.

## **NI KONDOLENCAS**

En aprilo forpasis la patro de la prezidanto de Hispana Esperanto-Federacio, Pedro Hernández. Ni kondolencas nian amikon pro tiu neriparebla perdo.

## **VENONTAJ PROGRAMOJ EN MADRIDO**

Ekspozicio pri Esperanto, pere de la paneloj de HEF, okazos fine de majo en kultura centro Viñagrande en Alkorkono (datoj konfirmotaj). Ĝi poste translokiĝos al San Lorenzo del Escorial, kiel prologo al la hispana kongreso; de la 13-a de junio ĝi estos disponebla en la kulturcentro de la strato Vista Bella, kaj poste en la kongresejo mem.

Niaj konversaciaj rondoj plu okazos regule ĉiulunde ekde la 18:30 h en la HEF-ejo, strato Rodríguez San Pedro 13-3<sup>o</sup>-7, tel. 914 468 079. Pri aliaj renkontoj, atentu la retajn diskonigojn en la retforumo [esperanto\\_madrیده](http://es.groups.yahoo.com/group/esperanto_madrیده) [http://es.groups.yahoo.com/group/esperanto\\_madrیده](http://es.groups.yahoo.com/group/esperanto_madrیده).

## **madrida esperanto-liceo**

San Alejandro 6-4<sup>B</sup>-ext. 28005 Madrid (nur poŝta adreso)

Ni kunvenas lunde je la 18,30 horo en Rodríguez San Pedro 13-3<sup>o</sup>-7, Madrid

<http://www.esperanto.es/mel/>

[saluton@wanadoo.es](mailto:saluton@wanadoo.es)

Redaktas Toño del Barrio

Komentojn kaj informojn sendu al [niavocho@gmail.com](mailto:niavocho@gmail.com)